



ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO

P.K. 39004, TEL-AVIVO

N-ro 70 - decembro 1979



האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

ת.ד. 39004, תל - אביב

העורך: אלכסנדרה מנור

חוברת 70 - דצמבר 1979

ISRAELA ESPERANTISTO

E N H A V O

La kontribuo de Zamenhof al la homara progreso A. Manor	1.
Letero de D-ro Zamenhof al BILU Ĥ. Haroun	2.
Nia devo antaŭ Zamenhof H. Tonkin	3.
Proverbaro esperanta A. Holzhaus	3.
More Sfat Esperanta J. Ŝ.	4.
Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA	5.
Jubileajn gratulojn al la Centjara Volapuko B. Golden	6.
Icik Manger en paradizo A.C. Jacobs (trad. J. Kohen Cedek)	9.
Kiel oni gajnas amikojn E. Kiŝon (trad. G. Ziegler)	10.
Al amiko kara D. Mager	12.
Izrael J. Ben Alter	13.
Mia testamento H. Maŝler	16.
El nia movado kaj agado	18.

ORGANO de ESPERANTO - LIGO
EN ISRAELO
P.K. 39004, Tel Aviv
N-ro 70 - decembro 1979

Ĉefredaktoro -
Aleksander Manor
redaktoro -
Josef Ŝemer

Aleksander Manor

LA KONTRIBUO DE ZAMENHOF AL LA HOMARA PROGRESO

Okaze de 120 - jara datreveno de lia naskiĝtago.


"Ni deziras krei ligantan ponton inter la gentoj...

Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝi, ne al-trudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn".

(El parolado de d-ro L.L. Zamenhof dum la tria kongreso, 1907, en Cambridge).

Por Zamenhof estis la kreado de lingvo internacia ne nur celo por si mem, sed rimedo por forigi unu de la plej gravaj obstakloj, kiuj disigas la homojn. Esperanto estis por li ne nur teknika ilo por solvi la problemon de internacia interkomunikado, sed antaŭ ĉio racia rimedo, kreado de spirita tuthomara ponto; unua paŝo por rekta reciproka alproksimiĝo de homoj de diversaj nacioj sen perado. Nun kiam estis forigitaj la geografiaj baroj inter la homaj gentoj, aperas Esperanto kiel angulŝtono por la konstruaĵo de la homara interkompreno kaj reciproka harmonia kunlaboro.

La unua paŝo al vera internaciismo, kiu ne estas ebla sen rekta kontakto de la homoj je bazo de reciproka komprenemo. Esperanto servas do kiel unua ĉenero, kiu estas kreita por la tuthomara ĉeno. Ĝi estas la unua fundamenta ŝtono por stablo de tuthomara ĥoro aŭ orkestro en kiuj la nacioj kaj ŝtatoj estas kiel muzikistoj



ludantaj diversajn instrumentojn. Esperanto aperas nun kiel neutrala fundamento por spirita internacia revolucio, kreanta novan mensan - kulturalan atmosferon. Ĉiu povas de nun konkludi ke se oni povas forigi lingvajn obstaklojn kaj limojn, kial ne aboli la aliajn arte konstruatajn limojn: politikajn, sociajn, ekonomiajn ktp. Tio signifas ke oni povas larĝigi la ponton inter la homoj de diversaj aliaj terenoj.

Tiel povas la ideo de Zamenhof pri internacia lingvo efektiviĝi revolucion en la homa penso, krei novan racian ordon. Ĉar ne povas esti pozitiva revolucio, kiu ne efektiviĝas antaŭe en la homa menso kaj spirito; kaj jam substrekis tion siatempe Karlo Marks, dirante, ke la diferenco inter la homo kaj abelo estas, ke antaŭ ol la homo faras ion, li kreas tion antaŭe en sia cerbo. Tio signifas ke ne povas okazi humana revolucio kiu ne efektiviĝis antaŭe en la homa cerbo kaj spirito. La internacia lingvo Esperanto kiun kreis Zamenhof devas servi kiel unua paŝo kaj instigo por realigi la humanan - humanisman revolucion pri kiu sonĝis la plej noblaj intelektuloj de la homaro.

LETERO de D-ro ZAMENHOF al BILU*

Hazarde mi eksciis pri iu letero de D-ro L.L. Zamenhof sendita al BILU -organizaĵo. Tiu letero troviĝis dum preskaŭ cent jaroj en la arkivoj de BILU-organizaĵo en Gedera. Lastatempe, dezirante skribi la historion de BILU, oni trovis la leteron. Mi kontaktis la Universitaton de Tel-Avivo kaj ricevis fotokopion de ĝi. La letero estas en la rusa lingvo, sespaĝa, datita novembro 1883. La persono kiu sendis la fotokopion postulis de mi ne publikigi ĝin antaŭ ol oni tradukos ĝin en la hebrean lingvon kaj aperigos ĝin en la nova eldono de la libro verkita de A. Drujanov, "Verkoj pri la historio de Hibat-Cion kaj la koloniado de Israellando" (dua volumo).

Intertempe aperis la libro de Ŝulamit Laskov, "Habituim", entenanta unu paragrafon de tiu letero. Mi turnis min al la fama Zamenhofologo N.Z. Maimon (Usono), la verkisto de "La kaŝita vivo de Zamenhof" kaj li respondis al mi jene:

"Mi supozas, ke temas pri letero de Zamenhof al Menaŝe Meiroviĉ, kiu estis ano de "BILU" kaj loĝis en Gedera. Tiu letero, en kiu Zamenhof informas sian amikon pri unuiĝo de du asocioj de Hibat - Cion en Varsovio, estas konata kaj menciita en la historiaj priskriboj de Hibat-Cion. Tamen, la teksto, aŭ la tuta teksto, ankoraŭ ne estas publikigita. Ĉiokaze, la letero estas grava aldonaĵo al la trezoro de Zamenhofaj leteroj."

Hananja Haroun

* BILU- nomo de la unua grupo de la cionista movado Hibat-Cion, kiu vojontritis al cionisma enkarniĝo pere de enmigrado al Israellando kaj persona aktivado; fondita en Ĥarkovo (Ukrajno) en la jaro 1882. Pioniroj de BILU fondis en 1884 la kolonion Gedera.

Humphrey Tonkin

NIA DEVO ANTAŬ ZAMENHOF

... Ni estas malmultaj, kaj la tasko estas granda, sed ni laboras por lingvo kaj idealo tiel gravaj kaj tiel signifaj, ke ni nek rajtas nek povas laciĝi aŭ deflankiĝi. Kiel lernintoj de Esperanto, kiel eltrovintoj de tiu miraklo de la homa komunikado, ni tiris sur nin, vole - nevole, la moralan devon antaŭ la mondo ĝin disvastigi kaj ĝin sukcesigi.

.....
Estu multaj la homoj pretaj kunlabori, ne ĉar ili sentas sin honorataj de la flatado de la publiko sed ĉar ili komprenas, ke la animo de la Internacia Lingvo estas pli granda ol ilia animo, kaj ke laboro por la tuta homaro estas pli bona kaj riĉiga ol laboro por la propra persono.

.....
Nia celo estas utiligi la pozitivajn flankojn de la homoj -- kaj ne kontraŭbatali sed ignori iliajn negativajn flankojn.....

La jaro 1978 - 79 estis ja bona jaro por nia afero. Estu 1979-80 ankoraŭ pli bona, pli sukcesa kaj pli fruktoplana. Nia mondo veas sub la batoj de homa krueleco, de krizoj, de militoj. Kiel parolantoj de la Internacia Lingvo, ni havas devon, antaŭ nia lingvo, antaŭ ĝia kreinto Zamenhof, labori por nova, pli komprenema, pli vivoplana, pli bela mondo. Ni renovigu la idealojn de la unuaj esperantistoj kaj ni aldonu la realismon de longe laborantoj por inda celo. Tiu realisma optimismo nin kondukos al sukceso.

(El parolado dum la inaŭguro de la 64- Universala Kongreso.)



PROVERBARO ESPERANTA

Marko Fabianoviĉ (=filo de Fabiano) Zamenhof (8 Feb. 1837-30 Nov. 1907. Lia biografio estas en mia libro "Doktoro kaj lingvo Esperanto", 1969, 524 p., sur p. 7-21), patro de L. Zamenhof (15 Dec. 1859 - 14 Apr. 1917), en 1874 publikigis libron "Kompara rusa-franca-germana frazeologio", 131 p. Mi transskribis proverbojn en alfabeto ordo kaj ricevis 1388 proverbojn en la rusa lingvo, 1276 proverbojn en la franca lingvo, 1420 proverbojn en la germana lingvo; entute 4084 proverbojn.

M. Zamenhof en 1905, 1906, 1907 publikigis tri kajerojn "Kompara rusa-pola-franca-germana frazeologio", 84p. M. Zamenhof en 1905-1907 ankaŭ publikigis tri kajerojn "Proverbaro Esperanta", 28 p. Mi transskribis proverbojn en alfabeto ordo kaj ricevis 1221 proverbojn en la rusa lingvo, 1368 proverbojn en la pola lingvo, 1027 proverbojn en la franca lingvo, 1110 proverbojn en la germana lingvo, 1715 proverbojn en Esperanto; entute 6441 proverbojn.

M. Zamenhof mortis en 1907 kaj post lia morto kvara kaj kvina kajeroj restis nepublikigitaj.

L. Zamenhof tradukis proverbojn de M. Zamenhof en Esperanton kaj en 1910 publikigis libron "Proverbaro Esperanta", 82 p. Proverboj estas ordigitaj en 1232 grupoj. Mi transskribis proverbojn en alfabeto ordo kaj ricevis 2630 proverbojn.

Estas 4084 proverboj de 1874, 6441 proverboj de 1905-1907, 2630 proverboj de 1910, Entute estas 13155 proverboj.

Rimarko: G. Rogister transskribis libron "L. Zamenhof. Proverbaro Esperanta", 1910, en alfabeto ordo kaj en 1961 publikigis libron "L. Zamenhof, Proverbaro Esperanta", 167 p.

Adolf Holzhaus

מורה שפת ספעראנטא

En la jaro 1909 aperis en Odeso, Ruslando, la dua eldono de la hebrelingva lernolibro de Esperanto, verkita de David Gurevič. La libro estas titolita מורה שפת ספעראנטא kaj ĝi enhavas ankaŭ du vortarojn ("ספרי מילים").

La unua estas hebrea-esperanta kaj la dua - esp. - heb. vortaro.

Okaze de la 70 - jara datreveno de la eldonto de tiu ĉi lernolibro ni aperigas ĉi tie kelkajn interesajn "perlojn" el tiuj vortaroj.

(Esperanto - Ligo en Israelo reeldonis tiun ĉi libron en 1970. Kelkaj ekzemploj estas akireblaj ĉe E.L.I.)

ripozi	קָבַח, נָפֵשׁ	polico	בֵּית פְּקִידוֹת
sapo	בֹּרֵיחַ	meti	לְהַנִּיחַ בְּאִיזָה מְקוֹם
kremo	קֶפֶאוֹן חֵלֶב	hotelo	אֶכְסֵנִיָּה
pipo	קֶנֶה קְטוּרָה	pupo	פֶּסֶל (צוּרָה יֶלֶד לְמִשְׁחָק)
poŝo	צִלְחַת הַבְּגָד, כֵּיס	kafo	מִשְׁקֵה הַקַּאפֶּפֶע
distrikto	פֶּלֶךְ, גְּלִיל	enui	הִלָּאָה מֵאִפְס עֲבוּדָה
preta	נֶבֶן, נֶגְמֵר	baleno	תַּנְיִן הַיָּם
neniu	לֹא שׁוֹם אִישׁ	spiri	לְשׂאוֹר רוּחַ
valizo	מִלְחָחָה	avo	זֶקֶן
ombrelo	גְּנוּנָה	borso	בֵּית אֹסֵף לְמוֹתָרִים
kuraĝo	עוֹז נֶפֶשׁ	cigaredo	גִּלְגָּם קְטוּרָה בְּנֵיִיר
kompati	לִקְחַת חֶלֶק בְּגוּרֵל זֹולְחוֹ	lago	יָאוֹר
kemio	חֲכֵמַת הַהֶרְכָּבָה וְהַפְּרָדָה	ŝtalo	בְּרוֹזֵל עֵשׂה
veneno	סַם הַמוֹת	ŝranko	אֲרֵז
ŝraŭbo	מַסְמֵר לוּלֵי	krajono	עֵט עוֹפְרָה

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Dum la jardeko, kiu nun malfermiĝas antaŭ ni, la Internacia Lingvo Esperanto fariĝos centjara. Tra la jaroj de post 1887, la lingvo alportis ĝojon kaj feliĉon al milionoj da homoj. Ĝi malfermis la horizontojn al simplaj civitanoj, ĝi dissemis sentojn de internaciismo kaj komprenemo en mondo malpaca, ĝi kreis kulturajn pontojn inter la nacioj, kaj ĝi ebligis praktikan komunikadon inter la homoj en spirito de egaleco.

Ĝia influo etendiĝis preter la uzantojn mem. Scioj akiritaj per Esperanto penetris en la sociojn, kaj la principoj de esperantismo efikis ankaŭ ĉe tiuj, kiuj ne konas la lingvon mem. Kvankam la rivaleco inter la grandaj naciaj lingvoj ankoraŭ regas en multaj internaciaj rilatoj, Esperanto abunde montris, ke ĝi kapablas plene ludi rolon de efika internacilingva komunikilo.

Restas tamen la demando, ĉu tiu lingvo plene elprovita fariĝos akceptita de la grandaj internaciaj organizaĵoj, la diverslandaj edukaj sistemoj, kaj la ĉiam kreskanta nombro da homoj, kiuj partoprenas la internacian komunikadon. Restas demando, ĉu oni utiligos ĝin kiel lingvon de la nova komunika teknologio. Aŭ ĉu oni preferas solvi la internacian lingvan problemon per diskriminaciaj solvoj, favorante certajn naciojn kaj lingvojn, kaj malfavorante aliajn?

La respondo al tiu demando restas parte en la fluo de la historio; sed parte ĝi restas en la manoj de la parolantoj de Esperanto. La mondo ne venos al Esperanto kvazaŭ nature. Se tiel estus, ĝi venus al paco kvazaŭ nature, ĝi venus al malarmado kvazaŭ nature, kaj ĝi estingus homan kruelecon kaj homan mizeron kvazaŭ nature. Male, ĝi venos al Esperanto ĉar la parolantoj de tiu lingvo konscie kaj harmonie kaj sagace laboros por tiu celo, forigante la sencion kaj farante el skeptikuloj konvinkitojn. Oni ofte aŭdas, ke ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, sed vere la ĉefa malhelpo estas sencio, kaj prudentaj duboj forigeblaj per pravaj argumentoj.

Ĉu, do, jardeko de la 1980-aj jaroj estos la jardeko de Esperanto, la jardeko, en kiu oni fine konsciiĝos pri la maljusteco kaj la necesaj kostoj de la nuna internacia lingva reĝimo? Lingvoj ne kreskas kiel arbaraj fungoj: ili bezonas jardekojn, eĉ cent jarojn, por maturiĝi. La Internacia Lingvo jam kreskis kaj maturiĝis: ĝi staras nun preta por tiuj, kiuj pretas utiligi ĝin.

En decembro 1979 kompletiĝas 25 jaroj da rekono de Esperanto flanke de Unesko: la fama rezolucio subtena al

Esperanto estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco en 1954. Tiu datreveno koincidas kun nova erao en la rilatoj kun Unesko kaj UN, inaŭgurita de la vizito de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al nia kongreso en 1977 kaj nun de la malfermiĝo en Novjorko de nova oficejo de UEA kies specifa celo estas fortigila rilatojn kun UN. En la jaro nun finiĝanta la sekretario de Ekosok vizitis nian kongreson, kaj UEA estis elektita al gvida rolo en la konstanta komitato de neregistaraj organizaĵoj ĉe Unesko.

UEA mem estas pli forta, pli harmonia kaj pli finance kaj morale stabila ol ĝi eble iam ajn estis. Niaj membroj estas lojalaj kaj sindonaj. Kaj novaj moviĝoj de intereso pri Esperanto animas kontinentojn antaŭe apenaŭ tuŝitajn de la Internacia Lingvo.

Staras preta la lingvo. Malfermiĝas al ni iom post iom la internaciaj organizaĵoj, la publika opinio. Pretas nia Asocio. Je tiu ĉi favora epoko, je la sojlo de nova jardeko, ni redediĉu nin al la laboro por la Internacia Lingvo per novaj fortoj. La jaro 1980, kaj la tuta jardeko, kiun ĝi inaŭguras, alportu pli pacan, justan kaj harmonian mondon, kie la spirito de egaleco kaj kompreniĝo animas ankaŭ la lingvan kampon per la Internacia Lingvo Esperanto.

Humphrey Tonkin

JUBILEAJN GRATULOJN AL LA CENTJARA VOLAPUKO

En sia parolado ĉe la 7-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Antverpeno en 1911, d-ro L.L. Zamenhof, inter aliaj temoj, atentigis la kongresanojn pri la okdekjara datreveno de la naskiĝo de Johan Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapuko. Nomante lin "la vera patro de la tuta internacilingva movado", Zamenhof laŭdis la laboron de sia pionira kolego, "kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo", kaj kies "grandaj meritoj... en la internacilingva historio neniam malaperos."

Esperantistoj ĉi-jare povas sekvi la ekzemplon de Zamenhof kaj gratuli la volapukistojn okaze de alia grava datreveno: en 1979 ili festas la centjaran jubileon de sia lingvo. La 31-an de marto 1879, por esti tute preciza, la inspiro krei internacian lingvon venis kiel revelacio al la poliglota germana pastro. Post unu monato Schleyer publikigis la unuajn informojn pri la nova lingvo, kiun li nomis Volapük, fonetike transformante la anglajn vortojn world, "mondo", kaj speak, "paroli".

En sia eseo "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia", Zamenhof substrekas la unikajn trajtojn, kiujn Volapuko havas komune kun Esperanto.

"...malgraŭ la grandega nombro da personoj, kiuj laboras super lingvoj artaj jam en la daŭro de 200 jaroj, ĝis nun aperis sole nur du efektive pretaj lingvoj, nome Volapük kaj Esperanto."

En la 19-a jc. ja estis publicitaj aliaj provoj krei internacian lingvon surbaze de la samaj principoj, kiujn Zamenhof aplikis: simpligo de la sintakso kaj uzo de plej internacia leksiko fontanta el la latina kaj latinidaj lingvoj. Inter tiaj lingvoj montrantaj similecon al Esperanto estas Pantos-Dimou-Glossa (de Rudelle, 1858), Universalglot (Pirro, 1868) kaj Néo-Latin (Courtonne, 1875). Kaj oni ne forgesu pri Lingwe Uniwersala, la unua formo de Esperanto, kiun la 19-jara Ludoviko debutigis en decembro 1878, kvaronjaron antaŭ ol Schleyer eklaboris super sia lingvo. Tamen, tiuj lingvoj estis esence surpape-raj projektoj, kiuj neniam akiris la apogon de organizita movado. Kontraŭe, kiam aperis la Unua Libro de d-ro Esperanto en 1887, la volapuka movado estis atingonta sian apogon ok jarojn post sia naskiĝo.

Johan Martin Schleyer (1831-1912) naskiĝis en urbeto Oberlauda apud Würzburg, Germanio. Li tre frue montris talenton por lingvolernado kaj poste fanfaronis, ke dum sia vivo li studis entute 88 lingvojn. En 1856 li estis ordinita pastro en la romkatolika eklezio kaj oficis plurloke en la sudgermania regiono Badenio. Lia unua kontribuaĵo sur la tereno de la interlingvistiko estis propono por kreo de universala skribsistemo por ĉiuj lingvoj de la mondo, publicita en 1878. La sekvan jaron li prezentis skizon de la gramatiko kaj leksiko de sia internacia lingvo sur la paĝoj de religia poezia revuo, kiun li mem redaktis kaj eldonis. Dum la 1880-aj jaroj li aperigis gramatikon kaj vortaron de Volapuko kaj komencis redakti la gazeton Volapükäbled (Volapuka Folio).

La unua volapukista grupo estis organizita en Germanio en 1882, kaj universala kongreso estis kunvokitaj en 1884, 1887 kaj 1889. Tiu ĉi jaro estis la kulmino de la disvastiĝo de Volapuko. Pli ol mil diplomitaj instruistoj disponantaj lernolibrojn en 25 lingvoj instruis la ŝlejeran lingvon al homoj en ĉiuj kontinentoj de la mondo. Jen interesa komparo. Hodiaŭ, post pli ol kvaronjarcento da vegetado, la riĉe financita sed nun bankrota Interlingua-movado de IALA (International Auxiliary Language Association), ankoraŭ ne atingis la nivelon de sukceso, kiun Volapuko atingis post nur unu jardeko da ekziste. Tio montras, ke estas sensencaĵo paroli pri rivalo inter la internaciaj lingvoj Esperanto kaj Interlingua. Nuntempe la Interlingua-movado ne nur stagnas; ĝi malprogresas. La samo okazis al la volapuka movado.

Post dek jaroj, la rapida kresko kaj disvastiĝo de Volapuko ĉesis. Apenaŭ estis fondita la Akademio de Volapuko, kiam kelkaj adeptoj, malkontentaj pro pluraj difektoj en la lingvo, komencis prisemi la movadon per reformproponoj. Tiuj semoj enradikiĝis kaj donis venenajn fruktojn, kiuj kaŭzis skismon en la movado. Schleyer rifuzis akcepti plibonigojn en sia lingvo kaj ne agnoskis la Akademion. La volapuka movado neeviteble malfortiĝis: kluboj disiĝis, gazetoj ĉesis aperi kaj multaj eminentuloj eksvolapukistiĝis kaj aliĝis al la nova Esperanto-movado aŭ tute perdis interesiĝon pri internaciaj lingvoj.

Schleyer mortis en 1912 kaj Volapuko estis devinta sekvi lin en la tombon. Sed ĝi ne faris tion. En la 1920-aj jaroj unu el la fidelaj sekvantoj de Schleyer komencis eldoni volapukan gazeton en Svislando. Unu jardekon poste la volapuka movado renaskiĝis, kiam d-ro Arie de Jong, nederlanda kuracisto, publikigis en 1931 gramatikon kaj vortaron de sia reformita Volapuko. Ĉirkaŭ li formiĝis la fenikssimila nova volapuka movado kun sia Akademio kaj periodaĵo. Dum la du jardekoj antaŭ sia morto en 1957, d-ro de Jong, kaj volapukistoj, kiuj akceptis la modifitan version de sia lingvo, verkis lernolibron en pluraj lingvoj por subteni la reenkariniĝon de la volapukismo. Tiuj verkoj ankoraŭ ne elĉerpiĝis, kaj ankoraŭ estas volapukistoj en 1979, kiuj aĉetas ilin.

Kiuj estas tiuj volapükflens (amikoj de Volapuko), kiuj klopodas malhelpi la morton de sia lingvo, por ke ĝi komencu sian duan jarcenton da vivo? Kaj kial ili deziras propagandi tiun lingvon, kies sorto estis sigelita antaŭ unu jarcento? Laŭ enketo, kiun mi entreprenis antaŭ duonjaro, ne pli ol dek uzantoj de Volapuko estas konataj nuntempe; ili loĝas dise en Anglio, Brazilo, Francio, Hispanio kaj Nederlando. Okaze de la centjara festo de sia lingvo, kelkaj adeptoj aktiviĝis por informadi pri la unua sukceshava internacia lingvo kaj la rolo de Schleyer kiel interlingvistika pioniro. Artikoloj aperis en gazetoj kaj eĉ estis aranĝita televida intervjuo en Anglio. En tiu lando fervora volapukisto eldonis anglalingvan lernolibron de Volapuko kaj redaktis novan bultenon, Vög Volapüka (Voĉo de Volapuko). Krome, de la plumo de unu samlandano venis volapuka lernilo verkita en Esperanto!

Esperantistoj tutnature interesiĝas pri Volapuko pro historia interrilato kun la evoluo de la zamenhofa lingvo. D-ro Zamenhof en siaj paroladoj kaj artikoloj plurloke ĝi menciis kaj en nefinita artikolo "Esperanto kaj Volapük" montris, ke li ja havis profundan scion pri tiu lingvo. Eĉ post la skisma disfalo de la volapuka movado, Zamenhof de tempo al tempo en siaj leteroj rimarkigis al aliaj esperantistoj la difektojn, kiuj pereigis la ŝlejeran lingvon, kun admono eviti la samajn mispaŝojn en Esperanto movado. En 1887 li skribis jene al Schleyer, informante lin pri Esperanto.

"Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimo por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro, ne timante ridegon de l' amaso. Mi mem plej bone komprenas kiom Vi devis suferi, ĉar mi mem trairis similan vojon."

Esperantistoj, kiuj volas esprimi similan estimon, gratulante la volapukistaron en ilia festa jaro, povas adresi siajn bondezirojn al ili en Esperanto, ĉar preskaŭ ĉiu volapükaflen, kiun mi kontaktis, bone scias nian lingvon!

Bernard Golden, Hungario



A.C. Jacobs, - skotlandano, el rondo de nuntempaj anglalingvaj judaj poetoj. Tradukis anglen versaĵojn de jidaj kaj hebreaj poetoj.

Icik Manger (Ĉernovic 1901 - Tel-Aviv 1969) - fama modern-skola poeto verkinta en jida lingvo.

A. C. Jacobs

ICIK MANGER EN PARADIZO

Manger sidas en la Paradizo per tĉo kaj kuk' regalata, kun "Ciela Literatura Skizo" - lia jida legaĵo sabata.

Pri siaj versaĵoj kritikon multlaŭdan li legas raporte; konsolan, ĝojigas efikon ĝi kaŭzas al li post-morte.

- "Interese, kiu rezone aŭtor' estas de l' artikolo? Ĉu reĝo Davido persone? - ĉar estas agraba kaĵolo!..

Antaŭ li mia nomo aperas sub mia versaĵ' tradukita; - "A.C. Jacobs"... - kaj li konsideras: - "Estas nom' por mi inkognita."

Relegas li verson kompilan: - "Ho, kia belega ĝi estas! Neniam mi ĝuis similan mielkukon!" - kun rav' li atestas.

Al Kafka li diras: - "Franc', se vi jam legis, do devas konsili al Heine, Jehuda ha-Levi, ke nepre tralegu ĝin ili!

Rekomendu, ke anĝel' Gabrielo akceptu ĉi tiun poemon por "Antologi' de Cielo" kaj pagu premian tantiemon!"

trad. J. Kohen-Cedek



Ephraim Kishon

Kiel oni gajnas amikojn

La teknika progreso kaj aparte la ĉiam novevoluantaj ebloj de komunikado ankaŭ en nia lando flankenŝovis aŭ eĉ tute forigis tedajn interhomajn barilojn — aparte vespere, kiam la fenestraj kurtenoj ankoraŭ ne estas tirfermitaj.

Iun vesperon sonoris ĉe nia pordo. Tuj la plej bona edzino el ĉiuj eksaltis, rapidis tra la ĉambro kaj diris al mi: „Iru kaj malfermu!“

Antaŭ la pordo staris geedzoj Grosman. Dovo kaj Lucio Grosman, agrablaj homoj mezaĝaj, en pantofloj. Car ni ĝis nun ne renkontiĝis, ili prezentis sin ne forgesante pardonpeti pro la malfrua ĝeno.

„Ni ja estas najbaroj“, ili diris. „Ĉu ni rajtas eniri por momento?“

„Ni petas.“

Per mirinda trafcerteco ili direktis siajn paŝojn en la salonon, ĉirkaŭiris la fortepianon kaj haltis antaŭ la teoprezentoĉaro.

„Jen, vidu do“, Lucio triumfe sin turnis al sia edzo, „ne estas kudrimaŝino.“

„Nu ja, bone!“ La vizaĝo de Dovo pro ĉagreno ruĝiĝis. „Vi venkis. Sed antaŭhieraŭ pravis mi. Ili ja posedas 'Encyclopaedia Britannica'.“

„Ne temis pri 'Britannica'“, Lucio lin korektis. „Mi diris nur, ke ili havante enciklopedion en sia domo cetere tre snobiĝis, kaj nenion pli.“

„Tre domaĝe, ke mi ne sursonbenidigis viajn ŝatatajn eldirojn!“

„Ja, tro domaĝe!“

Ne restis kaŝite, ke minacis enŝteliĝi en tiun konversacion iomgrada malamikeco. Tial mi proponis, ke ni kune eksidu kaj tiuforme konversaci, kiel decas inter plenkreskintoj.

Gesinjoroj Grosman kapjese akceptis — ĉiu unuopa. Dovo demetis sian pluvmantelon, kaj la du sidiĝis. La pijamo de Dovo estis grizablue striita.

„Ni loĝas en la domo vidalvide de l' via“, Dovo komencis montrante al ĝi. „En la kvina etaĝo. Pasintjare ni faris feriovojaĝon al Hongkongo kaj tie aĉetis bonegan binoklon.“

Mi konfirmis, ke binokloj el japana produktado estas plej altkvalitaj.

„Maksimuma pligrandigo unu el dudek“, fanfaronis Lucio tirante jen iun jen tiun harobukligilon. Per tiu binoklo ni ekvidas ĉiun detaleton en via loĝejo. Kaj Doĉjo kelkafoje kondukante kvazaŭ obstina mulo hieraŭ firme asertis, ke la malhela objekto

malantaŭ via fortepiano estus kudrimaŝino. Tiurilate li fakte ne estis detemigebla, kvankam oni klare povis ekkoni sur tiu objekto florovazon. De kiam do, florovazoj staras sur kudrimaŝinoj? Guste pro tiol Sed tion Doĉjo ne volis kompreni. Ankaŭ hodiaŭ ni disputis pri tio la tutan tagon. Fine mi diris al Doĉjo: „Ĉu vi scias, kiel solvi la disputon? Ni iru transen al ili por mem eltrovi, kiu el ni pravas. Kaj jen ni estas!“

„Kaj kiel vi pravis agante tiel!“ laŭdis mi. „Alkaze la disputo neniam estus finita. Ĉu ankoraŭ io?“ mi demandis.

„Sole la kurtenoj“, Doĉjo ekĝemis.

„Kio do pro la kurtenoj? Kaj kial vi ekĝemas?“ respondis mi.

„Car kiam ajn vi tirfermas la kurtenojn de via dormĉambro, ni ankoraŭ ĝuste povas vidi nur viajn piedojn.“

„Tio estas fakte amare malmulta!“

„Ne pro tio, ke mi volis plendi!“ Dovo retransviliĝis. „Vi do ne devas indulgi min. Estas ja via domo.“

La atmosfero de l' konversacio pli kaj pli varmiĝis. Mia edzino prezentis teon kaj salitajn bakajojn.

Dovo fingrumis je la suba flanko de sia brakapogilo. „Kion mi do volonte ekscius...“

„Nu, kion do?“

„Ĉu tie ankoraŭ gluiĝas maĉgumo? Se mi ne eraras, ĝi estis ruĝa.“

„Idiotajo“, kontraŭparolis Lucio, „ĝi estis flava.“

La malamikeco refoje ekflamiĝis. Ĉu do normale civilizitaj homoj povas paroli unu kun la alia eĉ ne kvin minutojn sen malpaci? Kvazaŭ tia bagatelo estus decida! Hazarde la maĉgumo estis verda. Mi sciis tion precize.

„Unu el viaj vespermanĝaj gastoj pasintasemajne ĝin gluis tien“, Dovo klarigis, „estis grandstatura kaj bone vestita viro. Dum kiam via edzino iris en la kuirejon, li elbuŝiginte la maĉgumon kaŝe ĉirkaŭrigardis, ĉu eble alia persono observus lin, kaj poste... kiel jam dirite.“

„Bonege“, subridis mia edzino. „Kiom vi do vidas!“

„Car ni ne posedas televidaparaton, ni alivoje devas distri nin. Vi do ne kontraŭas al tio, ĉu?“

„Neniell!“

„Sed vi devus pli zorge kontroli la fenestropurigiston, kiu ĉiusemajne unufoje venas al vi, tiun en la griza laborkitelo. Li tiuokaze iras en vian banĉambbron, kie li uzas vian senodorigilon (desodoranton).“

„Ĉu vere? Vi eĉ povas rigardi en nian banĉambbron, ĉu ne?“

„Ne tre bone. Ni maksimume ekkonas, kiu el vi staras sub la duŝo.“

La sekva averto koncernis nian bebogardistinojn. „Tuj kiam via malgrandulo ekdormis“, Lucio malkovris al ni, „la knabino sin retiras en vian dormĉambbron kun sia amato. Studento kun senrandaj okulvitroj.“

„Kiel oni povas enrigardi en nian dormĉambbron?“

„Neniell malbone. Sed kiel mi jam diris al vi, ĝenas la kurtenoj. Plue ne plaĉas al mi la florodesegno.“

„Ĉu almenaŭ la lumo sufiĉas?“

„Por diri la veron, ne, fakte ne! Kelkafoje oni povas ekkoni nur ombrajn konturojn. Fotografi ion tian oni tute ne kapablas.“

Doĉjo ekstaris purigante sian pijaĵon de sandviĉopaneroj, per kiuj mia edzino intertempe estis regalinta ilin.

„Ni ĝojas, ke ni fine interkonatiĝis elproksime kun vi“, li kore diris. Post tio li ŝerce min puŝis en la ripan zonan frustrante: „Atentu kontrole vian pezon, mia kara! Oni jam povas ekkoni vian ventron ĝis en la transa domo.“

„Dankon pro via averto“, mi respondis iom honte.

„Neniu kaŭzo por danki. Se oni povas helpi najbaron, oni tuj faru tion. Ĉu vi ne samopinias?“

„Kompreneble!“

„Kaj ĉu vi ne samopinias kun mi, ke tiu florodesegno sur viaj kurtenoj...?“

„Vi tute pravas.“

Ni petis gesinjorojn Grosman baldaŭ viziti nin denove. Iom pli malfrue ni vidis, kiel oni en la kvina etaĝo de l' domo trans la strato ekfunkciigis la elektran lumon. Kaj en unu el la fenestraj kadroj videbliĝis la svelta staturo de Doĉjo. Kiam li alokuligis la binoklon el Hongkongo, ni mansignis al li. Li resalutis. Nenia dubo: Ni gajnis novajn amikojn.

Tradukis Gerhard Ziegler



AL AMIKO KARA

Kion sentas mi al vi, ne limigu rimoj
 Nek belaj vortoj, nek taŭgaj esprimoj
 Mi ĝin diru simple, klare
 Iom ŝpareme, iom avare
 Por ke ne trou la belec' ekstera
 Kaj pro tio estu ĝi pli vera.
 Do simple dirite estas ni amikoj
 Pruvas tion, multe da aplikoj
 Sentas ni ĝin en la kora fundo
 Iasence estas ĝi abundo
 De homec', de sento pure vera
 Kian spertas nur estaĵ' surtera
 Transpasas ĝi ja limojn landajn
 Kaj obstaklojn ofte grandajn
 Flustras ĝin la kor', la lipoj
 Jen temas pri l' hungara, jen pri dazipoj
 Jen pri bestaj blekoj, jen pri spicaĵoj
 Kaj pri tekniko kaj pri aĉaĵoj.
 Tiun ĉi senton, eldiru mi koncize
 Sed tamen elkore kaj tamen precize
 Amikec' de tia spec' malofte okazas
 La lingvo internacia ĝin nur emfazas
 Sed mi jam tro multe ĉi tie parolis
 Mi preskaŭ forgesis, kion diri mi volis
 Do mi ĝin diru per nur unu vorto
 Kiu ne sonu kiel raporto
 Amikecon, oni ne mezuras,
 Sed ĝin sentante ni ege plezuras.

Muŝpelant'.



Jeñiel Ben Alter

IZRAEL

(Biblia rakonto)

Post laciga marŝado dum la tuta tago tra la dezerto, Jakob fine atingis la rokon, kie li kutimis kuŝiĝi por tranokto.

La suno jam kliniĝis al la disflamiĝanta horizonto apud la Granda Maro, sendante siajn lastajn radiojn al la tero. Sorĉa rebrilo de la subiranta suno ornamis per rozpurpuro la sablan dorsetojn de la grizblua ondetaro etendiĝanta sur la senfina dezerta surfaco.

Post longa, brulanta tago la vaste etendiĝanta dezerto ripozis. Apenaŭ sentebla, kvieta venteto de la maro refreŝiĝis per sia malvarma blowetado la sufokan aeron.

La flamanta suno jam malaperis kaj senlima grizo disfluis en la aero, disblovante la rozpurpuron kaj envolvante en malhelo la flavan sablaron.

Jakob ripozis sidante sur la tero kaj apogante sian dorson je la roko. Li pensis kiamaniere aranĝi por la morgaŭa tago la renkontiĝon kun sia frato kaj kiamaniere moligi lian rokan koron, ke li finfine forgesu la koleron, kiun li flegas kontraŭ sia sola frato.

-Esav estas mia frato, meditis Jakob - sed lia karaktero tute ne similas al la mia. Li estas venĝema, militema kaj senpardonema. Ĉu li konsetos repaciĝi kun mi, aŭ li postulos por sia kvazaŭa ofendo rekompencan en formo de sango?

El la koro de Jakob elŝiriĝis dolorplena preĝo:

-Dio de Abraham kaj Isaak, savu min, miajn edzinojn, infanojn kaj servistaron de la ungegoj de mia frato, de Esav. Ĉi ja scias, ke mi estas senkulpa. Mi eĉ ne intencis trompi mian fraton. Mi nur obeis la ordonon de Rebeĉka, filino de Laban, mia amata kaj honorinda patrino.

Jakob eksilentis. Li ne estis certa, ĉu Dio aŭskultis lian preĝon kaj ĉu Esav pardonos al li. Neimagebla timo ekregis lin.

-Mi devas moligi lian koleron, kontinuus Jakob sian meditado. - Nur per multvalora donaco mi sukcesos gajni lian avidan koron, ke li forgesu la pasinton. Jakob en siaj pensoj aranĝis la planon kiel renkonti sian fraton la morgaŭan tagon.

-Antaŭ ol li ekvidos min, li renkontu kaprinojn, kaprojn, ŝafojn, kamelojn, bovojn, bovinojn kaj azenojn. La servisto transdonos al mi la brutaron anoncante:

-Mi estas sendita al vi, sinjoro Esav, de via sklavo Jakob, por transdoni al vi la modestan donacon kaj peti vian favoron.

Jakob, kontenta de sia plano, vidas jam en sia imago Esavon ĝoja pro la valora donaco. Lia frato ĉirkaŭbrakas kaj kisas lin pro ĝojo, ĉirkaŭbrakas liajn edzinojn.

kaj karesas liajn infanojn. Fine restariĝis la paco.

Subite nigraj nuboj kovris la ĉielon kaj densa mallumo ĉirkaŭis Jakobon. Terura timo ekkaptis lin kaj doloriga penso ekboris lian menson:

-Kio okazos se Esav ne akceptos mian donacon, ne vlos pardoni, ne konsentos kun mia pacpropono kaj li nepre deziros ... sangon?

Kelkajn minutojn li sidis senmova, apogante sin je la roko.

-Mi deziras pacon, daŭrigis Jakob sian meditado - por tio mi preĝis al Dio de Abraham kaj Isaak. Mi eĉ estas preta pagi por ĝi la plej altan prezon. Se miaj pensoj restos vanaj kaj Esav nepre deziros militon, viktimojn, sangon...

Jakob ne povis decidi kion fari, kiel reagi kontraŭ sia militema frato. Li ne trovis eliron el la maloportuna situacio. Kelkajn minutojn li sidis senmove kaj fine decidis:

-Se Esav nepre deziras militon, mi ĝin akceptos. Mia armita servistaro, marŝonta post la brutaro proponota kiel donaco al Esav, scios kiel defendi la vivojn de miaj edzinoj kaj infanoj. Ho, ili scias la arton de milito. Se li deziros militon, li ĝin havos.

Jakob levis sian minacantan pugnon.

-Li ĝin havos, li ripetis.

Subite Jakob rimarkis de malproksime viron irantan al lia direkto. Liaj blankaj vestoj briletis de malproksime en nokta mallumo kaj hela aŭroro akompanis lin. Li paŝadis majeste kiel reĝo kaj proksimiĝis al Jakob, kiu por momento fermis siajn okulojn, ne povante rigardi en la vizaĝon de la fremda viro, kiu brilis kiel suno.

Jakob leviĝis de sia loko, klinetis la kapon kaj salutis la fremdulon:

-Pacon al vi!

-Al vi pacon! - resalutis la fremda viro.

-En tia malfrua horo sola en la dezerto? - demandis Jakob mirante.

-Ne gravas la horo. Mian taskon mi plenumas kiam ajn necesas, en ĉiu horo.

Post mallonga silento la fremdulo demandis:

-Kia estas via intenco, Jakob?

-Renkontiĝi kun Esav, mia frato.

-Kaj militi kontraŭ li? - demandis la fremdulo ironie.

-Mi jam preĝis al Dio, preparis donacojn kaj morgaŭ mi petos pardonon de mia frato. Se li tamen...

-Tiam vi per glavo militos kontraŭ li - interrompis la fremdulo.

-Jes, se li devigos min, mi militos.

-Atentu, Jakob, vi elektis malĝustan vojon. Vi forlasis la ordonojn de via patro. Erara estas via vojo. Ĉu

vi scias, ke via patro Isaak elstreĉis sian gorĝon dirante al via avo Abraham: Buĉu min kaj oferu min al Eternulo, se tia estas via volo. - Li ne kontraŭdiris eĉ unu vorton kaj ne ribelis kiel vi.

-Jes, sed la tempo de pasiva sintenado jam pasis. Mi kondutos laŭ mia maniero kaj ne elstreĉos mian gorĝon kiel ŝafo al la buĉisto.

-Ne blasfemu! - ekkriis la fremdulo per ordona voĉo.

-Tia estas mia neŝanĝebla decido. Per necedema volo mi decidis defendi miajn rajtojn por vivi kaj ekzistadi. Sangon por sango!

-Ne blasfemu! - ekkriis la fremdulo kaj kaptis Jakobon ĉe brako, premante lin nekompate.

-Ŝanĝu vian decidon - li ordonis kaj per subita puŝo faligis Jakobon.

Jakob per kata lerteco salte tuj leviĝis. Tiam la fremdulo refoje intencis puŝi lin, sed Jakob kaptis lian brakon kaj ambaŭ viroj komencis barakti inter si. La batalo fariĝis pli kaj pli obstina. Post iom da tempo la fremda viro diris:

-Rezignu, Jakob, de via ribela intenco kaj mi lasos vin libera. Alie vi estos perdita. Mi dispremos vin senkompate kiel...

-Mi ne rezignos de rajto por defendi mian vivon. Mi estas preta fali en batalo kaj ne lasi min buĉi kiel mia patro. Neniu forto kapablas ŝanĝi mian pravan decidon.

-Mi devigos vin.

Subite la fremda viro donis frapon al Jakob en la bruston faligante lin teren. Jakob tuj leviĝis sur siaj piedoj kontraŭatakante la fremdulon. Rekomenciĝis serioza interbatalo.

Multajn horojn la viroj luktis sur la dezerta sablo malseketa de nokta roso, ne povante venki unu la alian.

Dume oriente ĉe la horizonto la malluma ĉielo iom post iom paliĝis. Jen ĝi fariĝis griza, jen ŝanĝiĝis ĝia grizeco en roza koloro kaj jen en flama ruĝo. Iom post iom la nigra mallumo malaperis. La aero fariĝis pli kaj pli diafana kaj rozkolora ĉarmo disverŝiĝis sur la senfina, dezerta sablaro, kvazaŭ pentraĵo de sorĉista peniko.

La matenruĝo anoncis la finon de la nigra nokto kaj naskiĝon de nova hela tago. Jakob jam povis klare diferencigi la trajtojn de la vizaĝo kaj la majestatan figuron de la fremdulo kun kiu li baraktis la tutan nokton.

-Nia lukto estis finita - diris Jakob. - Forsendu min, ĉar brilas jam la tago, kaj donacu al mi vian benon.

La fremda viro metis sian dekstran manon sur la kapon de Jakob, benis lin dirante:

-Ne Jakob estu de nun via nomo, sed Izrael, ĉar vi luktis kun pli potenca forto ol vi kaj vi ne estas venkita.



MIA TESTAMENTO

Mi skribas pri mia testamento, por ke mia volo estu publike konata kaj efektiva. Ĝi ankaŭ eble donos instigon al aliaj samideanoj fari ion similan, ĉar nia antaŭenmarŝo dependas ankaŭ de mono, kiu estos en la posedo de ELI kaj UEA.

Laŭ la testamento, kiu estas en Ĥevra Leneemanut Ŝel Bank Leumi kaj en Ocma (Bank Leumi), post la morto de la dua el nia edziĝparo administradon de la heredaĵo prenos al si Ĥevra Leneemanut.

La enhavon de la loĝejo prenos miaj familianoj. La esperantaĵojn ricevos J. Semer. Loĝejo devas esti vendita kaj la mono devas resti sub administrado de Ĥevra Leneemanut. Ĝi devas doni al UEA 20.000 guldencojn, kondiĉe, ke ĝi ne estos en iu orienteŭropa lando kaj la domo de en Rotterdam ricevos nomon: "Domo de d-ro L.L.Zamenhof" kun subskribo: "Donaco de la juda popolo", (el la heredaĵo de fam. Maŝler.)

Ĉiujare ricevos de la restanta sumo po kvin procentoj ELI kaj Caar Baalej Ĥaim.

Post dudek jaroj la restanta sumo de la tuta heredaĵo devas esti dividita inter ELI kaj Caar Baalej Ĥaim po 50% kaj la administradon prenos al si ĉiu organizo, kiu devos agi laŭ la indikoj pri kiuj mi malsupre skribos.

La mono, kiun ricevos ELI, ne devas esti uzata por la ĉiutagaj elspezoj kaj I.E.

Jen estas la principoj laŭ kiuj ELI devos agi:

ELI devas sciigi pri ĉiuj premioj, kiujn ĝi volos disdoni, la gazetaron (hebrea, en Israelo).

La premioj devas esti sufiĉe altaj por ke ili estu allogaj. (Mi donas sugeston: Flugo al la kongreslando; dujara kotizo por UEA; multvalora e-o libro, eĉ rekta pago por la tempo, kiun eluzas aganto por e-o, por instruado, (se instruisto havos por la fina ekzameno minimume 10 lernantojn).

Por kio elspezi la monon? Presigi afiŝojn pri la kursoj en ĉiuj urboj en Israelo. Sciigi pri kursoj en junularaj ĵurnaloj, eldoni informilojn pri nia lingvo kaj agado, pagi al ĵurnalistoj, kiuj volos kaj scios presigi interesajn artikolojn pri esperanto (en hebrea gazetararo) aĉeti ĉiujare novajn librojn al la biblioteko, aĉeti lernolibrojn kaj vortarojn por forvendado. La librovendisto devas ĉiujare ricevi esperantan valoran libron laŭ sia elekto (krom la kutima pago de 10%, kiun li ricevos de UEA). Presigi valorajn tradukojn de hebrea literaturo. Eldoni diversajn lernolibrojn de e-o por ĉiuj aĝoj, por diversaj celoj, por diversaj ŝtupoj de inteligenteco; eldoni diversajn informilojn; aĉeti ĉiujn bezonajn ilojn por la agado, elektrajn tajpilojn, multobligilojn, flagojn, insignojn, e-ajn ludilojn; subteni per aĉetado diversajn anonci-tajn en e-a gazetararo; premi la plej bonajn lernantojn (kondiĉe ke ili regos la lingvon); aĉeti frandaĵojn por

la kunvenoj de JELI, aĉeti gastigaĵojn por la Zamenhofa Festo kaj la Landa Konferenco; premi ĉiujare agemajn por e-o samideanojn; subteni la kursojn en ĉiu loko en Israelo; helpi al la junaj gastoj de eksterlando. Atentu! La mono kiun ricevos ELI devas esti ĉiujare elspezita. Ĥevra Leneemanut devas ricevi raporton, kiel la mono estis elspezita. Se por iu entrepreno la mono de unu jaro ne sufiĉos (ekz. vortaro) oni povas ŝpari la monon ĝis 3 jaroj. Se la mono ne povos esti elspezita laŭ s.n. kondiĉoj, la restanta sumo devas ricevi UEA informante pri ĝi en Esperanto: "De la heredaĵo de fam. Maŝler." Se ELI ĉesos sian agadon, ĝian parton devas ricevi UEA, kiu de sia flanko devas zorgi por reestabli la israelan movadon. Se iam la ŝtato komencos zorgi pri e-o, la tutan restaĵon devos ricevi Caar Baalej Ĥaim.

Klarigoj: Ĥevra Leneemanut Ŝel Bank Leumi = sekcio de Bank Leumi, kiu okupiĝas pri la heredaĵoj. Caar Baalej Ĥaim: organizo, kiu zorgas pri la bestoj, kiuj bezonas helpon. Ocma = Sekcio de Bank Leumi, kiu zorgas pri la pensiaj fondusoj.

H. Maŝler

Aldono al mia testamento:

Fari interkonsenton kun hotelistoj: Se iu de la personalo en la hotelo scios la lingvon E-o, ELI presigos anoncojn en Esperanto kaj Heroldo pri tiu hotelo. Subteni per stipendioj ĉiujn sciencajn laborojn en la Universitato (doktoriĝ-disertacioj pri E-o kaj Zamenhof.) Doni stipendiojn al studentoj, kiuj elektos E-on, kiel helptemon por la diplomo. Subteni universitatan studon de E-o.

Subteni mone grupajn ekskursojn al la E-o kongreso kaj subteni eksterlandajn grupojn, kiuj vizitos Israelon.

H.M.

INTERNACIA FERIA ALTLERNEJO, SVISLANDO

IFA (ĉe Kultura Centro Esperantista) okazigos intensivajn kursojn, cele al preparo de lernantoj kiuj intencas kandidatiĝi por ekzameno pri Esperanto en sia propra lando.

La kursoj okazos en La Chaux-de-Fonds, Svislando, dum tuta semajno, la proksiman printempon. Estos tri niveloj: elementa, meza kaj supera.

Interesatoj turnu sin al IFA, p.k. 771, CH-2301, La Chaux-de-Fonds (Svislando).



EL NIA MOVADO KAJ AGADO

Okaze de la 120-jara datreveno de la naskiĝtago de D-ro L.L. Zamenhof ni havis kelkajn solenajn eventojn:

a. La 8.12 estis solena vespero, organizita de la Histadrut (Israela sindikata organizaĵo de laboristoj). En la solenaĵo, okazinta en la kulturdomo Bejt - Tavori, ĉeestis 250 personoj. Prelegis A. Manor kaj d-ro Maŝler hebrelingve. Intervjuis J. Semer.

La teatra aktoro Ŝmuel Acmon deklamis "La Preĝo"-n de Zamenhof en Esp. kaj en la hebrea kaj prezentis aliajn literaturaĵojn.

b. La 27-an 12. okazis la tradicia Zamenhof Festo en la domo de Jad-Labanim. Ĉi jare la tre sukcesan vesperon organizis la urbestro de Tel Aviv kaj ĝin aŭspiciis la vicurbestro, adv. Iĉnak Arci.

La tre riĉa programo dividiĝis en du partojn: hebrea kaj esperanta. Ĝi inkludis prelegojn, kantadon kaj deklamadon.

c. La Israela televido dissendis en decembro programon pri d-ro Zamenhof kaj la Internacia Lingvo destinita por infanoj. En ĝia kadro estis intervjuitaĵoj du ĉarmaj knaboj, lernantoj de Esperanto. La duo, kiu lernas en la lerneja kurso gvidata de Matilda Landaŭ, prezentis interalie esp. lingvan interparolon.

d. D-ro H. Maŝler aperis en intervjuo pri la sama temo en "kultursabato" (Ŝabat-Tarbut) la 15.12 en la amasplena salonego de la Muzeo de Tel Aviv. Intervjuis Iĉnak Livni. En la salono kun 600 sidlokoj estis ĉiuj okupataj kaj aldone tre multaj sidis sur la ŝtuparo inter la sidlokoj kaj malantaŭe (aŭskultis starante ĉirkaŭ 100 personoj).

e. Dum la semajno de Hanuka-festo okazis en la radio ("Kol Israel") intervjuo kun D-ro H. Maŝler kaj A. Wandel pri Esperanto - la lingvo kaj la Movado. La programo daŭris 15 minutojn kaj estis dissendata dufoje la saman semajnon: la unuan fojon en kadro de la matena pordommastrina programo kaj la duan fojon - en la vespera programo "Tio okazis en Hanuka".

f. La Eduka Televido (specialaj dissendoj por la lernejanaro) aperigis kelkminutajn informojn pri D-ro L.L. Zamenhof, okaze de la 120 - jara datreveno de lia naskiĝtago.

KURSOJ de ESPERANTO

1. En Tel-Avivo okazas kursoj, kiujn gvidas d-ro H. Maŝler kaj J. Murĵan en la Junulara Centro.
2. J. Murĵan gvidas 2 studrondojn de Esperanto por mezlernejoj en kadro de la formala studronda agado en du tel-avivaj gimnazioj.
3. D. Wunderbaum gvidas kurson en la klubo de Pensiuloj ĉe str. Rajnes, Tel-Avivo.
4. A. Ŝlajn instruas Esperanton en studrondo en la mezlernejo "Mekif" en Ramat Haŝaron.
5. M. Landaŭ kaj R. Alberg gvidas 2 rondojn en la elementa lernejo Grec en Tel -Avivo. Ili instruas tie speciale-kapablajn infanojn
6. A. Zajdman instruas la Internacian Lingvon en Teĥnijon (politeknika altlernejo), Hajfo. La unusemestra kurso okazas en la kadro de la formalaj elektblaj studfakoj.
7. D-ro H. Maŝler gvidas kurson por la progresantoj en la klubejo de E.L.I.
8. Koresponda kurso: p.k. 22041, Tel Aviv. Bonvolu informi pri ĝi al interesatoj.



KLUBAJ VESPEROJ

J. Lieberman	Emil Zola
J. Ŝuŝana	Rakontoj
R. Alberg	Lumbildoj de Svislando kaj Skandinavio
J. Wandel	Humuraĵoj
M. Jakobson	Rakontado
M. Landaŭ	Pri infankongreso en Svislando
J. Giladi	Proverboj
A. Manor	Niaj aktualaĵoj
H. Maŝler	Interparolo
R. Alberg	Politika diskuto



DISTINGO DE PREZIDANTO DE ELI

S-ano J. Ben-Alter, prezidanto de ELI, ricevis diplomon por la biblia rakonto "Izrael" en la literatura konkurso okazinta en Hispanio. En la konkurso partoprenis verkintoj el pli ol 40 landoj.

Ni aperigas la rakonton en tiu ĉi revunumero.

REELEKTO de A. WANDEL

La komitato de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), la junulara sekcio de UEA, reelektis en sia kunsido, okazinta en Julio, s-anon A. Wandel el Israelo kiel Estraranon pri Ekstera Varbado. Ni gratulas la elektiton kaj deziras al li sukcesan kaj fruktodonan oficperiodon.

JELI.

DELEGITA RETO de UEA en NIA LANDO

Dank' al la instiga aktiveco de s-ano J. Tilleman, komisiito de la komitato de ELI pri la Delegita Reto de UEA en Israelo, kreskis en la lastaj jaroj la nombro de la Delegitoj kaj Fakdelegitoj en nia lando. En 1979 estis Delegitoj en 13 urboj kaj vilaĝoj. Entute estis 25 personoj en la Reto.

Abontarifoj por la jaro 1980

S.A.T. -Jarkotizo kun Sennaciulo	- 65 francaj fr.
Sennaciulo (aperas monate)	- 40 " "
Sennacieca Revuo (unu fojojn jare)	-13 " "
Horizonto -	18 germ. markoj
Heroldo de Esperanto (21 fojojn jare)	-440 belg. fr.
Literatura Revuo -	19 ned. guld.

Monon bv. sendi en isr. liroj al s-ano J. Ben Alter, Petañ Tikva, p.k. 379

Jarkotizo por 1980

La jarkotizo por membreco en Esperanto-Ligo en Israelo por 1980, inkluzive abonon de la revuo Israela Esperantisto, estas 180 IL.

Bonvole pagu per la ĉi - aldonita poŝtbanka pagilo. Jara abonprezo de I.E. por eksterlandanoj estas 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Membro - kotizoj de U.E.A. por 1980

Individua Membro - Abonanto : 550 IL
Simpla Abono de la revuo Esperanto, sen membreco de U.E.A.: 330 IL.

Transpagu pere de la kotizperanto de U.E.A., s-anino Raaja Klajman, str. Arlozorov 119, Tel - Aviv. (tel. 03-260197).